

Aldonaj detaloj subtenantaj la Akademian decidon pri pasivecaj adjektivoj

Per ĉi tiu dokumento la Akademio celas doni pli da informoj al interesitaj homoj pri la bazo por la konstatoj kaj rekomendoj esprimitaj en la *Akademia decido pri pasivecaj adjektivoj*.

Unue estu klarigite, ke ĉiu eldiro kiu troveblas en la *Akademia decido pri pasivecaj adjektivoj* aŭ en ĉi tiu teksto pri la enradikiĝinteco de certa vorto kun certa signifo aŭ pri la ofteco de certa vorto kun certa signifo dum certa tempo baziĝas sur studo de la efektiva lingvouzo en la tekstoj de la Tekstaro de Esperanto. La Tekstaro de Esperanto entenas diverstempajn tekstojn de diversaj aŭtoroj ĝenerale konsiderataj lingve modelaj. Ĉi tiu studo estis farita de Akademiano Markos Kramer, kaj estas legebla ĉe www.xyz.eu.

Konsiderante la fakton, ke kelkaj el la kontestataj pasivecaj adjektivoj (precipe *korekta*, *falsa*, *konfuza*, *duba* kaj *komplika*) estas jam delonge forte enradikiĝintaj en la lingvouzo de spertaj parolantoj de Esperanto, oni povus demandi sin, ĉu ne ekzistas en Esperanto regulo, kiu permesas aldoni *-a* al verba vortobazo por formi adjektivon kun pasiveca signifo, do kun signifo parenca al tiu de pasiva participo, sed ial distinginda. Tamen la problemo estas, ke ĝi ne estas ĝenerale aplikebla regulo: Ekzemple ne eblas uzi *nutra*, *informa* kaj *ŝanĝa* en sencoj similaj al *nutrita*, *informita* kaj *ŝanĝita*.

Aldone konstateblas, ke la efektive uzataj pasivecaj adjektivoj plejparte estas rekte klarigeblaj surbaze de nacilingva influo: ekzemple *korekta* estas uzata en la senco de la franca kaj angla *correct* kaj la germana *korrekt*; *konfuza* estas uzata en la senco de la franca *confus*, germana *konfus* kaj hispana *confuso*. Ĉe *malferma* la nacilingva influo estas malpli rekta: en la angla kaj germana oni distingas inter la participoj *opened/geöffnet* derivitaj de la verboj *open/öffnen* (*malfermi*) kaj la adjektivoj *open/offen*, kiuj baziĝas sur la sama radiko kiel la koncernaj verboj sed ne estas participoj. En Esperanto tradicie ekzistas nur la participo *malfermita* por traduki kaj la participon kaj la bazan adjektivon de ĉi tiuj lingvoj. Sed ĉar en tiuj lingvoj ekzistas signifodiferencon inter la adjektivoj *open/offen* kaj kaj la participoj *opened/geöffnet*, tiulingvaj Esperantistoj emis enkonduki ĉi tiun signifodiferencon en Esperanton, kaj por tio utiligis la formon *malferma*.

Oni krome notu ke la Akademio en la *Baza Radikaro Oficiala* de 1974 deklaris la radikojn *fals/* kaj *fiks/* dukategoriaj (verbaj kaj adjektivaj).¹ Per tio la Akademio implice akceptis ke ne ekzistas ĝenerala regulo por derivi la pasivecajn signifojn de *falsa* kaj *fiksa* el la signifoj de *falsi* kaj *fiksi*; ĉar se ekzistus tia regulo, ĝi ne bezonus deklari tiujn radikojn dukategoriaj.

La manko de ĝenerala regulo por formi tiajn pasivecajn adjektivojn kaj la konstatebla nacilingva influo ĉe la plejmulto de la tamen uzataj pasivecaj adjektivoj estas la ĉefaj kialoj por tio, ke la *Akademia decido pri pasivecaj adjektivoj* ne estas favora al la uzado de tiuj pasivecaj adjektivoj. Preparante la decidon, la Akademio kompreneble ankaŭ konsideris argumentojn kiujn oni povus menciigi defende al la pasivecaj adjektivoj. Ĉi-malsupre ni koncize prezentas la tri plej gravajn el tiuj argumentoj kaj la kialojn, pro kiuj ili laŭ la Akademio ne estas konvinkaj.

1. Kvankam Esperanton karakterizas la relative multaj tre produktemaj vortfaraj principoj, ĝi same kiel aliaj lingvoj ankaŭ havas malpli produktemajn vortfarajn principojn, do vortfarajn principojn kiuj troveblas en pluraj tradiciaj esprimoj sed kiujn oni malofte uzas por formi novajn esprimojn.

¹ Notu ke en la okazo de *fiks/*, la Akademio nun nuligis sian antaŭan deklaron pri dukategorieco, dum en la okazo de *fals/* ĝi tiun deklaron konservis kaj pliprecizigis. La kialo por tiu malsama traktado estas ke konsiderante ke la esprimoj de la formo *fikse rigardi* kaj *fiksa rigardo* estas klarigeblaj en ne-pasiveca maniero, la pasivecaj uzoj de *falsa* estas multe pli oftaj ol la pasivecaj uzoj de *fiksa*.

Ekzemple la vortigo de frazeto per O-finaĵo² troviĝas en tradiciaj esprimoj kiel triangulo, subtegmento, perforto kaj onidiro, sed estas malofte uzata por formi novajn esprimojn. Simile la kunmeto de verba vortobazo kun la adjektiviga finaĵo -a por formi adjektivojn kun signifo parenca al tiu de pasiva participo de la koncerna verbo estas neproduktema vortfara principo. Sed oni ne bezonas pro tio kritiki la tradiciajn esprimojn formitajn per ĝi, simile kiel oni ne bezonas kritiki la tradiciajn esprimojn formitajn per vortigo de frazeto per O-finaĵo.

Responde al ĉi tiu argumento, oni unue notu ke la neproduktemo de la vortigo de frazeto per O-finaĵo klarigeblas per tio, ke tiuj kunmetaĵoj havas apartan signifon ne esprimitan en la frazet-vortigo (en la supre menciitaj kvar ekzemploj la neesprimitaj signiferoj estas *figuro*, *ĉambro/loko*, *trudo* kaj *afero*). La komunikado per tiaj esprimoj povas funkcii nur, se la parolanto povas supozi ke la aŭskultanto konas aŭ povas mem diveni tiun subkomprenatan signifon. Tio klare malhelpas al produktema uzado de tiu vortfara principo. La formado de pasivecaj A-vortoj tamen ne havas tian principan kialon por esti neproduktema. Oni facile povas imagi planlingvon, kiu entenas tian principon de vortfarado kiel tre produkteman principon. La ekzistantaj pasivecaj A-vortoj en Esperanto tamen povus ŝajni al lernanto de Esperanto ke ekzistas tia produktema principo. Sekve ili estas misgvidaj en maniero, en kiu la vortigo de frazeto per O-finaĵo ne estas.

La uzado de formoj kiel *korektigi*, *kompliki* kaj *vekigi* en la sencoj de *korekti*, *kompliki* kaj *vekigi* montras ke la pasivecaj adjektivoj kombine kun la normala vortfarado de Esperanto kaŭzas signifajn problemojn, kiujn aliaj neproduktemaj vortfaraj principoj ne kaŭzas.

Ĉar preskaŭ ĉiuj problemaj pasivecaj adjektivoj estas klarigeblaj surbaze de nacilingva influo, oni povas bone argumenti ke temas tute ne pri Esperanta vortfarado, eĉ ne pere de limigita neproduktema vortfara skemo, sed simple pri senpripensa paŭsado de nacilingvaj formoj.

2. *Multaj adjektivoj formitaj per aldono de -a al verba vortobazo havas similan signifon al aktiva participo, ekzemple interesa, nutra kaj brula. Estas neniu kialo por trakti malsame ĉi tiajn aktivecajn adjektivojn kaj la kontestatajn pasivecajn adjektivojn. Aŭ oni akceptu ambaŭ specojn de adjektivoj, aŭ neniun el ili.*

La Akademio ne akceptas, ke ekzistas aparta regulo por interpreti adjektivon formitan el verba vortobazo kaj la finaĵo -a simile kiel aktivan particon. Anstataŭe, la Akademio opinias, ke la signifoj de adjektivoj kiel *interesa*, *nutra* kaj *brula* estas klarigeblaj kiel plipreciziĝoj de la ĝenerala signifo *rilata al aŭ karakterizita de la ago interesi/nutri/bruli*. La plipreciziĝo de ĉi tiu ĝenerala signifo al io similsignifa al aktiva participo ŝuldiĝas nur al la signifo de la verboj *interesi*, *nutri* kaj *bruli*, kaj ne al iu aparta regulo por interpreti tiajn adjektivojn. Ĉi tiuj okazoj do estas similaj al la okazoj *skriba* kaj *parola* klarigitaj en la *Akademia decido pri pasivecaj adjektivoj*: Ĉe *skriba* kaj *parola* temas pri plipreciziĝoj de la ĝenerala signifo *rilata al aŭ karakterizita de la ago skribi/paroli*; la signifoj de *skribi* kaj *paroli* kaŭzas ke ĉi tiuj plipreciziĝoj estas similsignifaj al pasivaj participoj.

Certe estas tiel, ke la ĝenerala signifo *rilata al aŭ karakterizita de la ago V-i* pli ofte plipreciziĝas laŭ la kunteksto kaj laŭ la signifo de la vortobazo V al io similsignifa al aktiva participo ol al iu similsignifa al pasiva participo. Tio simple ŝuldiĝas al la fakto, ke la pasivaj participoj malsame al la aktivaj participoj havas la apartan funkcion ŝanĝi la rolojn de subjekto kaj objekto, pro kio ili prezentas pli grandan signifmodifon ol la aktivaj participoj.

3. *La signifoj de la participoj V-ita kaj V-ata mem povas esti konsiderataj plipreciziĝoj de la ĝenerala adjektiva signifo rilata al aŭ karakterizata de la ago V-i.*

2 La esprimo vortigo de frazeto per O-finaĵo estas uzata en la Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko kaj estas klarigata tie en sekcio 37.4.

Unue necesas klarigi, ke ĉe la plipreciziĝo de tiu malpreciza ĝenerala signifo regas la principo ke la ĝenerala signifo ne emas plipreciziĝi al signifo kiun oni povas pli bone alimaniere esprimi, kiel la participaj signifo. (Simila principo regas ĉe kreado de verboj surbaze de substantiveca vortobazo: Tie ĝenerale estas granda fleksebleco en la eblaj signifo de la verbo; sed se la koncernan signifon oni pli bone povas esprimi per *V-igi* aŭ *V-iĝi*, tiam oni ne rajtas diri *V-i*.)

Tio tamen nur estas argumento kontraŭ tiuj pasivecaj adjektivoj, kies signifoj tute identas kun la signifo de participo. La plej multaj pasivecaj participoj tamen estas uzataj en iomete alia signifo: Ekzemple, la pasiveca senco de *korekta* ja similas al *korektita*, sed tamen klare ne estas tute samsignifa al ĝi. Jen kiel oni povas klarigi kial tamen tiu pasiveca senco de *korekta* ne povas esti konsiderata plipreciziĝo de la ĝenerala signifo *rilata al aŭ karakterizata de la ago korekti*:

Oni devas preni en konsideron la signifon de la radiko por determini, ĉu derivaĵo estas akceptebla aŭ ne. La signifo de la radiko *korekt*/ entenas la ideon de statŝanĝo. Tial tiu ideo de statŝanĝo ankaŭ devas esti en la adjektivo *korekta*. Adjektivo, kiu indikas staton post la ŝanĝo devas esti provizita per sufikso (ekz. *-it-*) indikanta post-agan staton. Simile *veka*, derivita el radiko, kiu signifas ŝanĝon de stato, ne povas signifi staton, dum *maldorma* ja povas, ĉar ĝi estas derivita el radiko, kies baza signifo implicas ĝuste staton.

Konsiderinte kaj kontraŭinte ĉi tiujn tri argumentojn por favora traktado de la pasivecaj adjektivoj, restas la demando kial la Akademio ne pli klare malrekomendas la pasivecajn adjektivojn, kvankam ĝi ja nomas ilin nekoheraj kaj proponas alternativojn al ili. Por klarigi nian toleron de la pli enradikiĝintaj pasivecaj participoj, ni atentigas la legantojn pri jena eldiro de Zamenhof en lingva respondo de 1906 (Respondo 3, *La Revuo*, Decembro 1906):

“Ne sole en naturaj lingvoj, sed ankaŭ en lingvo artefarita ĉio, kio estas uzata de la plimulto da bonaj verkistoj, devas esti rigardata kiel bona, se ĝi eĉ ne estas absolute logika; ĉar se ni postulos ĉiam nur logikon absolutan, tiam la libera uzado de lingvo artefarita fariĝos tute ne ebla, ĉar tiam malaperos ĉiu utileco de longa ekzerciĝado kaj en la deka jaro de uzado de la lingvo, kiel en la unua jaro, ĉiu devus konstante tro longe pripensadi kaj pesadi ĉiun sian vorton. Tamen la diferenco inter lingvo natura kaj lingvo artefarita konsistas en tio, ke, dum en la unua oni devas uzi nur tiujn formojn, kiujn uzas bonaj verkistoj, kaj uzado de formo pli logika estas malpermesata, — en lingvo artefarita ĉiu havas la rajton uzi formon pli logikan, kvankam neniu ĝis nun ĝin uzis, kaj li povas esti konvinkita, ke se lia formo estas efektive bona, ĝi baldaŭ trovos multajn imitantojn kaj iom post iom elpuŝos la malpli logikan, kvankam ĝis nun pli uzatan formon malnovan.”